

VERDA FAMILIO

NEPRAVIDELNÝ dvojjazyčný zpravodaj Esperantského klubu v Mnichově Hradišti,
pro členy a příznivce mezinárodního jazyka.

Odpovědný redaktor – MUDr. Josef Hradil, 29501 Mnichovo Hradiště, Družstevní 1161

Cena: dobrovolný příspěvek

Podávání novinových zásilek povoleno Oblastní správou pošt Střední Čechy v Praze,
č.j.P/Fiš-2295/92 ze dne 16.XI.1998

[illegible][illegible]

Ĉu vi kapablas argumenti por Esperanto? (Fino) Plua aserto de la kontraŭuloj ke E-o estas lingvo kiu „pereis pro sekteco de la kluboj kaj pro organiza malkapablo.“ - Bazo de la esperantista vivo estas la kluboj. Ni bonkore akceptu novajn membrojn de nia klubo. Ili venas por trovi esperantan medion, por ellerni kaj ligi kontaktojn kun spertaj esperantistoj, kiuj kapablos konsili. Ili – pliparte junaj homoj – seniluziĝas ĉar ili trovas aron da maljunuloj, pri kiuj ili facile pensas, ke ili estas stranguloj (podivíni) fermantaj sin per scio de interkomprena lingvo en nevenkeblan nepenetreblan fortikaĵon, kiu alportas ĝuon nur por ili. Tiumomente perdas la klubo sian sencon. Anstataŭ por disvatigi la lingvon, ĝi servas por forpelo (odhánění) de interesuloj, kiuj aŭ perdas intereson plue progresi aŭ pliparte fariĝas izoluloj. Gardegu etoson de via kluba vivo. Estas konate, ke esperantaj kluboj havas saman karakteron, kiel aliaj kluboj de libervolaj laborantoj. Mankas disciplino por subiĝi al decidoj de kluba estraro kaj bonvolo direkti sian propran agadon laŭ plano de la klubo. Niaj scioj facile transformiĝas de diskutrondoj al disputrondoj. Ni neniam forgesu la fakto, ke ni ĉiuj venis en e-an medion ne kun volo finance pliriĉiĝi, sed kun deziro helpi al bona ideo de internacia interkompreniĝo, kiu estas sola rimedo kontraŭ minacanta katastrofo de monda pereco. Pro tio ni ofertas nian opinion kaj obeeme subiĝas al kolektiva decido. La demokrataj principoj gvidu nin en nia kluba vivo. Kiel ili povus esti realigeblaj se ne en nia esperanta medio? - En nia movado mankas ankaŭ organiza elemento, kiu per freŝdata anoncado de adresoj de korespondemuloj faciligus unuajn paŝojn de komencantaj esperantistoj. Validus poste peno pri instruado de infanoj, kiuj ne trovante praktikan uzon de ilia lernitaĵo faras la aferon eferema (pomíjivou) kaj perdas kontakton kun esperanta mondo.

Malforteco de E-a organizo prezentas sin per nekapablo liveri instruistojn por eduki lernejan junularon kaj nur poste propagandi ĝin en lernejoj. Ni ne estas maturaj por amasa disvastigo de nia lingvo pere de lerneja instruado, pri kiu ni tiom sopiras ...

Niaj oponentoj asertas, ke sub verda flago ariĝas nur revuloj, kiuj ignoras la lingvan mondan situacion, nevolante agnoski, ke la gvidan rolon transprenis la angla lingvo. Ili scias nenion pri la interna ideo de Eo, kiu arigas ĉirkaŭ si tipon de homo aktive sopiranta pri interkompreniĝo ne nur lingve, sed ankaŭ kondute. La granda ideo de pacigo de animoj prezentas sin ne nur en publika medio, sed ankaŭ en ĉiu esprimo de homa konduto kaj bonvolemo, kiu estu inter esperantistoj ne nur tutmonde, sed precipe inter najbaraj nacioj, en familioj kaj en ĉiuj homaj interrilatoj. Komence estis la VORTO (kiel diras la biblio), ĉikaze (v tomto případě) esperanta, naskita en idealismo. Nobeligis ĝin persekutado de totaliteco post kiu ĝi revivantiĝis. Ĉiu rimedo por homa interkompreniĝo estas allasebla, eĉ per gestoj kaj per frapado kontraŭ prizonaj muroj. La verda koloro de Eo signifas naturon kaj esperon.

Eĉ la evoluantaj landoj ne akceptis E-on – opinias pesimismuloj. La praktika bezono de interkompreniĝo en koloniaj ŝtatoj kaj areoj de influo de la angla gvidis al kreado de dominiaj konvenciaj dialektoj, elkreskitaj spontane, tamen havantaj trajtojn de formeco kaj gramatika konstruo, kia estas ekzemple „Pidgin English“ sur la ĉina bazo, ĉirkaŭpreninta Azion kaj transirinta eĉ en Aŭstralion. Ankaŭ kreiĝis aliaj lingvaĵoj, bazantaj sur arabaj kaj aliaj lingvoj. Tio estis stimulo por sciencistoj el Cambridge en la jaroj 1926-1930 prilabori „Basic English“ nombranta 850 vortojn (600 substantivojn, 150 adjektivojn, 100 verbojn k.a.). Tamen ĝi portas ĉiujn trajtojn de simpligita lingvaĵo. Ekzemple en traduko de Gulivero: kiam li forprenas de liliputojn la ŝipojn, ili superŝutas lin per amaso da „pointed sticks“ (=akrigitaj bastonetoj), ĉar por la substantivo „sago“ inter la substantivoj (600) de Basic English mankis loko. La ĉiutaga angla lingvo nombras nun ĉ. 60000 vortojn. Kaj tamen Basic English plenumis ĝis tioma grado sian praktikan rolon, ke en la j. 1943 Roosevelt kaj same Churchill opiniis necese antaŭpuŝi ĝian instruadon. La brita registraro aĉetis de la aŭtoroj kopirajton, rekomendis uzi ĝin kaj ĝis la j. 1947 oni disvastigis 2000 titolojn en 2,5 milionoj da ekzempleroj. Kompreneble Basic English nek kapablas kontentigi la kulturajn bezonojn, nek povas iri ekster kvadron de la angla lingvo. Tamen ĝi montras eblon de praktika solvo de la praktika uzo kaj solvo de la problemo precipe al ni, esperantistoj, kiuj povas nur ĝemi kaj sopiri pri tia subteno. Tamen la procezo de okcidentaligo de la mondo per uzo de la angla estis bremsita per rezisto de la tia mondo kontraŭ imperielisma doktrino de subiĝo lingva kaj kultura, kaj sopiro pri prezentado de propra kulturo. Ankaŭ la pola soldato ekziliinta en Anglujon estis starigita antaŭ problemon de rapida lerno de la angla kaj solvis ĝin en fermitaj siaj korpusoj per kreo de propra lingvaĵo t.n. „pinlish“ (polish-english). La provoj krei similan sistemon multiĝas. Tia estas publikaĵo aperinta en Japanujo, titolita „The Simplest Auxiliary Language BAMB“. La aŭtoro proponas lernolibron de nova lingvo kun ellaborita sistemo de gramatiko kaj kun vortaro ĉerpanta el vortoprovizo de fororientaj lingvoj. Povus esti, ke por Azio kaj Oceanio tiu provo povus ludi tian rolon, kiel Eo por hindoeŭropaj landoj. Tamen ĝi ne trovis sufiĉan eĥon kaj falis en forgeson.

Multaj malamikoj de Eo asertas, ke „Eo kiel historia provo ne plu havas ŝancon transvivi“, tro frue entombigante ĝin. Dum en erao de totalismaj reĝimoj Eo enhavis pro persekuto odoron de malpermesita frukto, sopiron pri interhomaj kontaktoj translimaj, eĉ se ofte primitive motivigitaj per interŝanĝo de diversaj objektoj k.s., nun tutmonda ekonomia problemaro fermas senbrue limojn por pli nobla agado, kulturaligo, amikecoj k.s.. Eo travivis kaj superombris aliajn lingvojn internaciajn. Tio pledas por Eo. La provo de tempo ĝi eltenis bone. Kvankam ne tiel rapide, kiel ni atendis, iom post iom ĝi estis ensuĉita en sferon de vivanta mondo kaj per tio ĝi fariĝis viva elemento.

Kelkaj oponantoj de nia lingvo opinias, ke E-o pereis pro sia sekteco. Certe vi scias, ke E-o ne pereis. Mi eĉ kuraĝas aserti, ke pro sia centjara firma enskribo al la kultura historio kaj ligiteco al ĉiuj braĉoj de la kulturo ne plu povas pereii, malaperi. Ĉiam troviĝos homoj, kiuj interesiĝos pri la ideo de la internacia lingvo kaj inter ili tiuj, kiuj anstataŭ produkti novan provon, kiu devus longe atendi sian praktikan uzon, etendos la manon por la jam kreita kaj disvolvita, pruvita lingvoj. Alia problemo estas la sekteco mem. Bazo de la esperantista vivo estas la kluba vivo. Ni bonkore akceptu la novajn membrojn de nia klubo. Ili venas trovi esperantan medion, por ellerni. Ili estas pliparte junaj homoj kaj seniluziĝas, ĉar ili trovas aron da gemalsanuloj, pri kiuj ili facile ekpensas, ke ili estas stranguloj, fermentaj sin per scio de inter interkomprena lingvo en nevenkeblan kaj nepenetreblan fortikaĵon, kiu alportas ĝuon nun por ili. En tiu momento perdas la klubo sian sencon. Anstataŭ por disvatiĝi la ILon, ĝi servas por forpelo de interesuloj, kiuj aŭ perdas intereson plue progresi, aŭ fariĝas izoluloj (pliparte), troviĝante kontentiĝon nur en medio de siaj revoj kaj korespondaj kontaktoj. Kontraŭ tiu socia aferaĵo, kiu ja ne estas specifa nur pro e-a medio, sed por tuta aro da aliaj malgrandaj socioj, ekzistas nur sola konsilo: kaptu la talentitan junulon (inon), iom flatu lin asertante pri lia talento kaj diru trankvile, ke ni ne estas konvena socio por li, ni scias tion, sed ĝuste LI estas la persono antaŭdistinita por savo de nia klubo, se LI ellernos inter vi la lingvon kaj mem kolektos ĉirkaŭ si la junularon, kiun LI povos instrui. Tiamaniere vi kaptos lian intereson kaj li englutos amaran tablojdon, ke li ne trovis socion konvenan por li kun aperanta ideo, ke li mem povos instrui kaj gvidi junularon. Ili havu siajn planojn kaj separiĝu, eksidante ĉe la parta tablo en la klubejo. Tia estis tradicio en la praga klubo. Lia longjara estro s-ano Šustr ofte rememoris tempojn, kiam li sidadis ĉe la opozicia junulara tablo.

Gardegu estos de via klubo. Estas konate, ke E-kluboj havas saman karakteron, kiel aliaj kluboj de libervolaj laborantoj. Mankas disciplino por subiĝi al decidoj de kluba estraro kaj bonvolo direkti sian propran agadon laŭ plano de la klubo. Miaj socioj facile transformiĝas de diskutrondoj al disputrondoj. Ni neniam forgesu, ke ni ĉiuj venis en esperantan medion ne kun volo finance pliriĉiĝi, sed kun deziro helpi al la bona ideo de la internacia interkompreniĝo, kiu estas sola rimedo kontraŭ minacanta katastrofo de monda pereco. Pro tio ni ofertas nian opinion kaj obeeme subiĝas al kolektiva decido. Demokrataj principoj gvidu nin en nia kluba vivo. Kie ili povus esti realigeblaj, se ne en nia E-medio? Ĉio saĝa estas jam eldirita – restas nur plenumi ĝin.

Ofte oni diskutas pri la senco de Internacia Lingvo. Laŭ la grado de lingvoscio de la uzanto de IL-o ĝi estas komence nur lingvo koresponda, kiu bezonas vere nur malgrandan tempon por lerni bazajn principojn. Poste oni povas uzi ĝin profesie en nia fako – EO estas la plej konvena lingvo por teknika kaj scianta interkompreniĝo. Sciencistoj nepre atendis inventon de konvena interkompreniĝilo. Multaj opinias, ke ne estas necese lerni artefaritan lingvon, ke sufiĉas primitiva scio de la angla, ĉar sciencistoj uzas ĉiukaze nur fragmenton de la vorta provizo en ilia praktika esprimado. La plurjara laborinto de Albert Einstein, teoriisto pri fiziko, unu el la kreinto de nelinea elektrodinamiko kaj kreinto de la teorio de la relativeco, skribis, ke la angla lingvaĵo de Einstein enhavis ne pli ol 300 vortradikojn. Kaj la angla estas lingvo de Unuĝintaj Ŝtatoj de Ameriko, kiun tiu ĉi eminenta sciencisto elektis je sia patrujo kaj kie li loĝis de la jaro 1933 ĝis sia morto en la 1955a jaro. En tiu lando Einstein vivis kaj kree laboris en sia scienca branĉo, ne parolante ĝian lingvon. Kvankam li ne kapablis interkompreniĝi dum kutimaj lingvouzoj en surstrata komerca kaj privata vivo, lia lingvo-provizo sufiĉis por interkompreniĝo inter sciencistoj-fizikistoj. Kelkaj adeptoj de scienco en sia junaĝo entuziasme lernis E-on, transirante en la sciencon mondon, ili uzis aliajn lingvojn kaj ili rememoras E-on nur kiel revon de sia junaĝo, kiun tio ke ili estas malmultaj kaj ne kuraĝis enkonduki E-on en sciencon uzon. Necesas ardiĝi, kvankam primokite tamen aranĝi sciencajn konferencojn, kie E-o estas la labora lingvo, propagandi uzon de IL-o en sciencaj verkojn almenaŭ en resumaj finpartoj. Ĉiun sciencistoj ĝojigas, se li legas alilingvan tekston el lia fako, kiun

li komprenas sen uzo de vortaro. Tia E-o estas kaj ĝi estos sola, kiu povas servi tiusence. Per uzo en tekniko kaj scienco ĉesas E-o esti nenieslingvo kaj komencas la periodo de ĝia praktika uzo. Dum lasta dekjarro estos faritaj tiudirekte grandajn antaŭpaŝoj, kiuj komencis eldono de la GRANDA Plena Ilustrita Vortaro. Tie povas ĉiu fakulo trovi bazon por uzo en sia fako. La granda Bildvortaro kaj fakaj vortaretoj, kiuj dum lastaj jaroj aperi, kompletigas necesan provizon **da faktvortoj**. Daŭran kompletigon gardas nia Akademio.

Fine ni rememoru la biblian citaĵon: „Komence estis la vorto.“ Vorto de interkompreniĝo estis eldirita, ĝi estas Esperanto. Ni zorgeme gardu ĝian torĉon por sendifekte transdoni ĝin al la sekvaj generacioj. (Fino)

La redaktoro petas pardonon de la legantoj, ke estis dum preso de nia bulteno interŝanĝitaj la paĝoj VF 1/94 p.2 je VF 2/94 p.2, kion certe la atentema leganto konstatis.

Internacia junulara seminario 15.–21.VI.94 – vere internacia renkontiĝo kun 100-200 ĉeestantoj. Pli preciza informo ing Dvořák, Čes.esp.svaz same kiel pri la 3-aj internaciaj E-kursoj por gejunuloj en Prago kunlabore kun Germana Esperanto-Junularo 7.-14.VII. Loĝado en studentaj hejmoj.


Nekutima propagando de Esperanto. Specialan propagandon de E-o praktikas s-ano Jindřich Tomíček el Říkovice, kiu partoprenadas en diversaj vetkuradoj. Kiel grupon, kiun li reprezentas, li ĉiam mencias „Esperanto Olomouc“. En la lasta tempo li tiel partoprenis en Silvestra vetkurado en Moravský Beroun kaj la saman tagon ankaŭ en Olomouc. Tie krom li vetkuris ankoraŭ unu plua esperantisto el Olomouc. Dum la lotumado de rememorphremioj s-ano Tomíček salutis ĉeestantoj en nomo de esperantistoj. Plue 8-an de januaro li partoprenis en XIV-a vetkurado de persistemuloj el Olomouc kaj la 15-an de tiu monato en jubilea 20-a vetkurado „La vintra Blaník“ en Vlašim, ĉiukaze kun bonaj rezultoj kaj ĉiam kiel reprezentanto de „Esperanto Olomouc“ (kontribuaĵo de s-ano JUDr Vladimír Mohapl).

Kunlaboro de mezmoraviaj esperantistoj. Esperantistoj el Prostějov iniciatis kreon de komuna laborkomitato, kies celo estus kunordigi la agadon de E-grupoj en Meza Moravio. Membroj de ĉi tiu komitato estas reprezentantoj de E-grupoj en Olomouc, Prostějov, Přerov, Uničov kaj Vyškov. Januare kunvenis la komitato en Olomouc, februare en Prostějov okaze de jarkunveno de tiea (tamĝiŝiĥo) klubo. Denove kunvenos la komitato en Marto en Olomouc, kie estos pritraktita la kunlaboro de la partoprenantaj grupoj dum la dua kvaronjaro 1994. (Dr. Mohapl).

Esperanto en „Naše rodina“. Populara ĉeĥa gazeto „Naše rodina“ publikigas nun Esperanto kurson el la plumo de sperta lernolibra aŭtoro Josef Cink. Enkondukojn verkis Jaroslav Mařík pri la monda Esperanto-valuto kaj Daria Michalová-Sokolová pri la katolika Esperanto-tendaro en Sebranice.

Esperanto v „Naší rodině“. Populární český časopis „Naše rodina“ uveřejňuje nyní E-kurz z pera zkušeného autora učebnice Josefa Cinka. Úvody napsali Jaroslav Mařík o světové esperantské valutě a Daria Michalová-Sokolová o katolickém esperantském táboře v S.

Frank Buckley – okdek jaroj. Laŭ letero de liaj amikoj tiu ĉi angla advokato kaj Esperanto pioniro, festos sian okdejariĝon la 16-an de junio 1994. Kiam li atingis 70 jarojn, li ricevis pli ol 300 naskiĝtagajn gratulajn bildkartojn el la tuta mondo, kiuj faris interesan propagandan ekspozicion en la loka biblioteko. Sendube multe da amikoj deziros sendi bildkartojn ankaŭ okaze lia 80a naskfesto, kaj simila ekspozicio okazos en Bristola publika biblioteko dum junio kaj septembro 1994. Frank verkis 6 teatraĵojn (inter ili ankaŭ „La ĉeĥoslovaka porko“) komponis kelkajn kantojn kaj kongresan uverturon „Esperantiana“. Li reĝisoris kaj prezentis 6 programojn dum Universalaj Kongresoj. Li ĉiujare vizitis multajn klubojn kaj Esperantajn kulturcentrojn, kie li sukcese helpis la programojn per siaj interesaj prelegoj (entute 58). Li ricevis diplomojn de Brita EA (nun Esperanto-Asocio en Britujo) kaj Cseh-Instituto. Li estas dumvivmembro (doživotní člen) de la Brita Esperanto-Asocio kaj Universala Esperanto Asocio kaj prezidanto de la Bristola Esperanto-Asocio. Dum longaj jaroj i instruas kaj propagandas Esperanton. Se vi povas, sendu afable bildkartan gratulon, kiu ĝojigos la meritplenan samideanon: Frank Buckley, 620 Filton Avenue, Bristol, BS 12 7LD Anglio.



**EŬROPA
ESPERANTO-FESTIVALO**

Unika programo
antaŭ la Universala Kongreso
Organizanto:

Hungaria Esperanto-Asocio
H-1368 Budapeŝt, Pf. 193

Tel.: (36-1)268-03-06 Fakso: 268-03-31

13a Internacia Literatura Forumo
Bratislavo-Slovakio
2 – 6 julio 1994

LA ESPERANTO - KABARETO

Organizanto:
Kooperativo de Literatura Foiro

Informoj:
Esperanta PEN-Centro
H-1581 Budapeŝt Pf. 117

Preskorekto: Pardonu nian misinformon pri „1111 spritaĵoj“ de s-ano Ing Borský. Li ne plu disponeblas kun la libro, ĉar li jam ĉiujn ekzemplerojn disdonis, tamen se iu havos seriozan intereson, li volonte pruntedonos al li sian originalon.

Ĉi tiu numero estas la lasta, kiun vi ricevos, se vi ne sendis dum la lasta jaro kiun ajn financon subtenon, por montri vian intereson legi ĝin.

SOMERA ESPERANTO-TENDARO en Lančov okazos, kiel ĉiujare en tri 14-tagaj etapoj ek de la 3a de junio 94. La unua etapo estas distinita precipe por geskoltoj. Vi povas refreŝiĝi en tempoperiodo ekstertendara. Informoj ĉe Esperanto-Klubo 67401 Třebíč.

ARANĜOJ POR ESPERANTISTOJ, kiujn por vi peros (zprostředkuje) KAVA-PECH, entrepreno de D-ro Petro Chrdle, Anglická 878, 25229 Dobřichovice:

Kolokvo de Akademio de Esperanto „Pri la stato kaj estonteco de la internacia lingvo Esperanto, Praha 7.-14.7.94.

SAT-kongreso en Strážnice 16-23.7.94 kun antaŭkongreso en Prago 9.-16.7.94 Flugkaravano al la 79-a Universala kongreso en Seul kun sekva kvartaga vizito de Japanio 22.7.-5.8.94.

Edutech 94 – La kvara praga konferenco pri kibernetika pedagogio; kunlabore kun AIS San Marino kun Universitato de Karlo sub aŭspicio de ties rektoro, Prago 23.-25.8.94. El laborlingvoj nur parte esperanta.

Aŭtobusa karavano al 13a Sanmarina Universitata sesio 25.8.-6.9.94.

Prago kultura kaj turisma 7.-10.10.94: precipe (sed ne nur) po la partoprenontoj de la sekvanta simpozio.

Entreprenado pere de Esperanto – Skokovy 10.-13.10.94.

Tra turismaj perloj de suda Bohemio 13.-16.10.94 turisma daŭrigo de antaŭa seminario en Skokovy.

Dorsa lernejo – seminario por ĉiuj kiuj suferas pri dorsdoloro en Skokovy – ellerno de metodoj kiel preventi ĝin.

Invito de Nova jaro en Prago 29.12.94-2.1.95: riĉa turisma kaj amuza programo kun eblo ĝin plilongigi por skisemajno en ĉeĥa montaro Šumava.

Senprokraste informiĝu pri prezoj kaj kondiĉoj ĉe KAVA-PECH.

Sukcesa 8-a Ĉeĥa-Saksa tago kun Zamenhofa vespero okazis la 11an decembron en Ústí nL. La granda renkontiĝo estis dediĉita krom rememoro al la kreinto de la IL-o precipe al la vivantaj naskiĝdatrevenoj de la du e-o eminentuloj, nome 89jara Josef Vondroušek kaj 80jara Jaroslav Mařík, ambaŭ honoraj membroj de ĈEA. Krome estis rememorita vivverko de Jaroslav Novobilský, patro de prof. Novobilský, kiu pereis en nazia koncentrejo. S-ano Smyčka paroladis pri bazaj taskoj de esperantismo kaj varbis al kunlaboro kun Radikala partio, kiu uzas E-on por internaciaj kontaktoj. Ĉefkuracisto Dro Pavel Páral prelegis pri lastaj konoj pri AIDS. En vespera koncerto estis rememorita precipe la verko de la poeto Štefo Urban kaj junaj artistoj prezentis klasikajn muzikajn verkojn. La klubo en Ústí dum longaj jaroj prezentas altkvalitan ĉiujaran kulturajn travivaĵojn en supera arta nivelo. Kiu ne partoprenis, povas nur bedaŭri kaj havas ŝancon estontjare korekti sian eraron.

Vigle aktivas ankaŭ la klubo en Prostějov, kies regulaj kunvenoj, aranĝado de kursoj, publikado en gazetoj de informoj pri siaj agadoj, montras ekzemplon, kiel devas aspekti ekzempla agado de la klubo.

Ĉefa ĉijara E-konferenco estos 67a SAT kongreso en Strážnice, kie vi certe povos ĝui internacian etoson kaj ligi novajn amikecojn. La riĉa programo faros ĝin neforgesebla. Se vi ankoraŭ ne decidiĝis, nepre petu informojn kaj aliĝilon ĉe s-ano Vladimír Hasala, poŝtkesto 36, 69662 Strážnice. La kongreso okazos 16.-23.7.94, kaj antaŭkongreso estos en Prago.

Forta kaj vigla grupo estas E-klubo en Vítkovice kun 70 anoj. Post jarkunveno la estraro restis la sama: estro L.Němec, sekretario Drahoslav Kočvara. La klubo kunvenas ĉiumerkrede en Katolika domo, Šalounova 38, kursoj ek de la 16a kaj membra kunveno ek de la 18a horo.

Straňánek František, estinta longjara estro de la klubo en Paskov forpasis la 1-a de januaro 94 en la aĝo de 78 jj post longa malsano. Li neniam estos forgesata de siaj e-amikoj, kiel modesta kaj oferema s-ano.

Uzu prave prepoziciojn: (Daŭrigo)

DE – estas prepozicio uzata en multaj sencoj. Rilate punkton de la spaco: foriri de iu loko, veturi de Berlino al Parizo; desalti de la ĉevalo; puŝi ion de si; la vazo falis de la tablo; viŝi de sia vizaĝo koloron; ili diferencas de ni nur per la koloro; ricevi de iu donacon; sin levi de ĉe la tablo; ekstermi (vymítit) popolon de sur la tero. - Rilate la punkto de la tempo, kie komenciĝas ago: de nun; de tiu tempo; Grabowski enkondukis ekde, Zamenhof uzis de post, detempe de, de post la tago; de post la apero de homo sur la tero; de post la tago, kiam li forlasis sian patrujon; li estas batalisto detempe de siaj plej junaj jaroj; de antaŭ kvar tagoj li kuŝas ne manĝante; - rilate la kaŭzon: tremi de febro; paliĝi de kolero; de kantado senpaga dolora la gorgo; ili ebriiĝis (opili se) sed ne de vino; - Rilate la aganton de la ago esprimata per pasiva aŭ pasivsenca verbo: li estis ĉirkaŭita de la tuta familio; ŝi estis amata de ĉiuj; dika branĉo rompiĝis de la vento; la tablo estis kovrita de servanto per tapiŝo; De kiu estas tiu libro? Tio dependas de cirkonstancoj. - Rilate al substantivo: La libro de Petro; la palaco de la reĝo; sumo de mil frankoj; vojo de tri tagoj; duono de kuko; la amo de la gepatroj al siaj idoj; mortigo de homo estas krimo; konfuzo povas esti dum uzo de sinsekvaj pluraj „de“: nutrado de infanoj de ilia patrino – pli bone estas uzi „fare de“ aŭ „far“: nutrado de infanoj fare de ilia patrino ... aŭ ... nutrado de infanoj far patrino; oni povas uzi ankaŭ „al“: nutrado de patrino al infanoj; - Pro multisenceco de DE estas ofte konsilinde anstataŭigi ĝi, se eble, per pli preciza prepozicio: el, pri, pro, super, kontraŭ, antaŭ k.s.: la fruktoj el la ĝardeno; honorprotekteco super la kongreso; la konkludo el la leciono; la problemo pri la senarmiĝo. - Rilatante al adjektivo aŭ adverbio: glaso plena de akvo; esti kontenta de io; malproksima de; meze de; norde de; kaŭze de; helpe de; komence de; kondiĉe de; sekve de; for de l' okuloj. En vortkunmetaĵoj: deigi: apartigi, mezi (ion) malproksime de: en tiaj globkrajonoj oni povas deigi la skribpinton; Deigi = fariĝi apartigita: ĝia kalkanumo deigiĝis; ekde: la komenco ekde ...: ekde Pollando-divigo jam sabron (ŝavle) li ne portis; ekde tri jaroj la pesto furiozis (řádit) en la lando; ĉiuj gradoj de armeo, ekde vicleŭtenanto ĝis generalo. - DE uzata prefikse (předponou): defali, deflui, deformi, deklini, demeti, delasi, deskvamiĝi, deverŝi, devojigi. Kemiaj kunmetitaj vortoj: dehidrokolesterolo, dehidrogeni (=des). - Laŭ PIV

Kiel diri? Praktika esperanta frazeologio kompilita de Lentaigne. (Daŭrigo)

Temo: KONGRESO. Prezenti proponon en taŭga formulo. Tiu propono akiris ĉies (vŝech) aprobon (souhlas). Oni devas disigi tiujn du proponojn. Ĉiu ano (člen) disponas unu voĉon. Voĉdonado (hlasování) per aplaŭdoj), per sido-staro, per kartlevo, per manlevo, per sekretaj balotiloj. Mi rajtigas vin voĉdoni en mia nomo. La forestanta estas ĉiam mal-prava. Sin deteni (zdržet se) de voĉdonado. Rezolucio akceptita unuanime, per aklamo, senopone, post longa marĉando (handrkování). Disciplina cedo de malplimulto al plimulto. Proponi, voĉdoni, forĵeti rezolucion. Oni elektis lin kiel prezidanton (= oni elektis lin prezidanto). Ŝarĝo pena sed honoriga. Honora prezidanto. Preni sur la ŝultroj tiom da respondeco. Havi sur si tre grandan moralan respondecon. Aklami la elekton de nova prezidanto (elektita per aklamo). Ektondris tempesto (bouře) de aplaŭdoj. Neĉesema aplaŭdo. Ovacio. Fermi la kongreson. Brilanta sukceso. Brila aranĝo de la kongreso. Ĝi povas esti kalkulata kiel la plej grava el ĉiuj kongresoj. Provizi la gazetaron per informoj pri la kongreso. La malfermo de la kongreso estis disaŭdigata en la nacia sendostacio. Kolokvo. Simpozio. Seminario.

KORESPONDI DEZIRAS (Mallongiloj): bk=bildkartoj; ĉt=ĉiuj temoj; d=deziras; iŝ= interŝanĝi; jj=jaroj; kol=kolektas; kor=korespondi; pm=poŝtmarkoj; s-ano=samideano; s-ro=sinjoro; tm=tutmonde.

Koresponda servo ĉe Korea Esperanto Asocio, CPO kesto 4258, Seulo, 100-642 Koreio – korespondemuloj petataj skribi kun plena adreso kaj personaĵo kun deziroj. Ligu amikecon kun lando, kie ĉijare okazos la UKo!

Ŝanhaja esperanto asocio havas 100 membrojn. Inter ili vi certe trovos korespondemulon. Ĝen. Sekretario Wang Minhao CN-200020 Shanghai. Huaihai Zhonglu 622-7 aŭ Ŝanhaja Fremdlingva universitato (prof. Wei Yuan shu, CN Shanghai, Dalian xilu 500 Shanghai Internacional Studies University.

Hang-Zhou Esperanto Asocio, p/a ĝenerala sekretario Li Zhong-min, CN 310006, Hangzhou, Renhe-lu 31 – vigla grupo de 100 membroj kaj 60 lernejaĵ infanoj.

Jiang Xi Esperanto Asocio havas 100 membrojn, kiuj havas bonan kapablon je konversacio en Esperanto. Adreso S-ino Gu-Jianhua, CN Jiang-xi, Nanchang Yang-ming-lu 20, Jiang xi Zhongyi Xueyuan – kaj la junulara grupo de 60 membroj: Nanchang Junulara Esperanto-Asocio p/a s-ro CAO Xiong-ling, CN 330008, Jiangxi, Nanchang, Ruziulu 25 hao.

Pekina Esperanto ligo havas 400 membrojn, eldonas gazeton El popola Ĉinio, koresponda adreso: Ĉina Esperanto-Ligo, CN-100037, Beijing, Fuchengmenwai Baiwanzhuang-lu 24.

Cvjatko Todorov, str. Vjadjaŝko vastanie No20, BG 9701 Ŝumen, Bulgario, 55j malnova esp-isto interesiĝas pri esperantaĵoj, pm, bk; pretas gastigi esp-istojn el la tuta mondo.

Grupo de 10-14jaraj gelernantoj. Adreso de la lernejo: instruisto s-ro P.Gajdos, Kinizsi Pál Altalános Iskola, Kurucz u.32, H-4028 Debrecen, H.

Boguslaw Sobolstr.Gospodarska 55, PL 05822 Milanowek, laboranto de flughaveno en Varsovio, okupiĝanta pro aero-trafiko dez kor kun samfakulo.

Grudniewski Tadeusz, pk I, PL 83130 pelplin 44 jara instruisto, interesiĝanta pri turismo, foto, bona muziko, artoj d kor tm.

xmxmxmxmx

xmxmxmx

xmxmx

xmx

x

Eperantský klub
CZ Mnichovo Hradiště

Podávání novinových zásilek povoleno oblastní správou pošt
Střední Čechy v Praze, čj.P/Piš-2295/92 ze dne 16.XI.1992